

1 – **Fervoja Stacidomo**
2 – **Konferencejo**: Instituto Salesiano, *p.le San Benedetto 5*
3 – Hotelo „Lazzaro“, *via XX Marzo 14*
4 – Monaĥejo S. Giovanni *placo San Giovanni, 1*
5 – Hotelo „Moderno“, *via A. Cecchi 4*
6 – Maljunula Komitato „Il Tulipano“, *via Bonomi 23/A*
7 – Junulargastejo „Foresteria Edison“, *largo 8 Marzo 9/A*
8 – **Malfermo** en Provinca Palaco, *viale dei Martiri della Libertà 15*
9 – **Simpozio**, en Departemento pri Fremdaj Lingvoj, *viale San Michele 11*
10 – **Lingva Festivalo** en „Biblioteca Civica“, *vicolo Santa Maria 5*
11 – **Bankedo** en restoracio „Corale Verdi“, *vicolo Asdente 1*

La 39-a ILEI konferenco

DUA INFORMILO

Konferencejo

La 39-a ILEI-konferenco okazos en *Istituto Centro Salesiano San Benedetto*, situanta en la centra parto de la urbo, 5 min. piede de hotelo Lazzaro kaj de monaĥejo San Giovanni Evangelista kaj 15 minutojn piede de la stacidomo kaj de hotelo Moderno.

Komputilejo

Biblioteko

Interna korto

Eblas antaŭmendi tagmanĝon/vespermanĝon je la prezoj de 10 €, kion ni nepre rekomendas, ĉar aliloke la kostoj estos multe pli altaj kaj Vi devos perdi tempon por serĉi taŭgan lokon en la urbo.
Se Vi ankoraŭ ne aliĝis kaj ne mendis tranoktojn kaj manĝojn, rapidu tion fari kaj rememorigu tion ankaŭ al Viaj geamikoj, ĉar por mendoj atingontaj nin post la 10-a de majo 2006 oni devas aldone pagi 40,00 €. Post la 25-a de junio 2006 ankaŭ en Instituto Salesiano ni ne plu povos por vi mendi tranoktejon. Se Vi mendas lokon en amasloĝejo, bonvolu kunporti proprajn litotukojn, viŝtukojn kaj dormosakojn.

PRISKRIBO DE LA PROGRAMO:

La 25an: posttagmeze ekskurso DT1; vespere Interkona Vespero kun diverslandaj manĝoj, alportitaj de konferencanoj. Ni mallonge prezentos nin mem kaj niajn landojn laŭ deziroj de la partoprenantoj.

La 26an: matene malfermo, ekskurso DT2; posttagmeze ekzamenoj; vespere *Lingva Festivalo, Nacia Vespero* kun prezento de Parma, Modeno kaj aliaj ĉarmaj lokoj en Italio.

La 27an: matene ekskurso DT4 kaj *Scienca Simpozio* pri la konferenca temo: prelegoj de gastoj; posttagmeze *Simpozio* – dua parto (prelegoj de konferencanoj), ekzamenoj, ekskurso DT3; vespere arta programo.

La 28an: matene ekzamenoj, posttagmeze ekskurso DT5, fermo*;* vespere *Bankedo* kaj *Internacia Arta Vespero* al kiu kontribuos, laŭdezire, la partoprenantoj.

La 29an: matene forveturo al UK kaj survoja vizito de *Bologna* kun gvidado de esperantlingva ĉiĉerono tra la urbo.

ĜENERALE PRI LA PROGRAMO

La artaj kaj distraj vesperoj: la Interkona kaj la Internacia okazos en la korto aŭ klasĉambro de *Instituto Centro Salesiano San Benedetto,* depende de la vetero **la Nacia** ĉe *Biblioteca Civica*, *vic. S. Maria 5*.

Simpozio okazos en aŭlo *Meazzi* de la Universitata Departamento pri Fremdaj Lingvoj, *aleo Sankta Michele 11*, 43100 Parma.

Lingva Festivalo okazos en la korto de la *Biblioteko „Civica“,* aŭ en la biblioteko mem *vicolo Santa Maria 5,* depende de vetero kaj teknikaj kondiĉoj.

Solenaĵoj: inaŭguro okazos en la salono *Borri* de la Provinca Palaco, *Stradone Martiri della Libertà 15*. **Fermo** okazos en la teatro de la *Instituto Centro Salesiano San Benedetto*.

Bankedo okazos en tre ĉarma medio kiu nomiĝas *Ristorante Bar CORALE G.VERDI,* en vicolo Asdente n .9, 43100 Parma. Dum ĝi ni ĝuos specialaĵojn de parma kuirarto: plurajn salaĵojn, farĉitajn pastoringojn kun spicherboj, farĉitan bovidaĵon, terpomojn kaj salaton, fragojn kun glaciaĵo, italan kafon, digestigilon, vinojn de Parma, mineralan akvon k.t.p.. Certe por la vegetaranoj estos pretaj pladoj kun tre bongustaj fromaĝoj kaj multe da freŝaj legomoj kaj fruktoj.

Seminarioj: 1) *Projektoverkado*, gvidata de prof. *Eva Polakovà* (SK), donos al Vi eblecon spertiĝi en la pretigo de projektoj de diversaj fondaĵoj; ĝi okazos tri fojojn po 2 horoj; 2) *Interkulturo*, gvidata de la prezidanto de ILEI *Radojica Petrović* (SB), donos al Vi eblecon pli bone ekkoni la projekton kaj uzi ĝin por viaj celoj; ĝi okazos tri fojojn po 2 horoj.

Paneldiskutoj pri la temoj: 1) *E-literaturo* (spertoj kaj pritaksoj de konferencanoj pri E-literaturo kaj plej ŝatataj E-verkoj, utiligado de E-verkoj en E-instruado, modernaj evolutendencoj de E-literaturo); 2) *Revuoj de ILEI* (IPR kaj Juna Amiko: pritaksoj, evolutendencoj, bezonoj, deziroj, eblecoj); 2) *Konferencoj de ILEI* (pritaksoj, evolutendencoj, bezonoj, deziroj, eblecoj)

Kunsidoj de **komitato** estas antaŭvidataj la 26-an kaj la 28-an posttagmeze kaj tiu de la **estraro** la 25-an kaj 27-an posttagmeze.

Ĝenerala asembleo — renkontiĝo de estraro kaj ĉiuj partoprenantoj por diskuti pri atingoj kaj planoj okazos la 28-an posttagmeze antaŭ fermo.

Dum la konferenco vi povos ĝui prelegojn proponitajn de niaj samideanoj kaj invititaj gastoj, partopreni ekskursojn, ĝui kulturan programon.

Detala programo aperos en retpaĝo de ILEI (http://www.ilei.info/) kaj konferenca libro kun resumoj de prelegoj por simpozio kaj ĝenerala programo. Ĝi enhavos ankaŭ priskribojn de aliaj programeroj kaj kelkajn utilajn informojn.

Organizantoj dum la konferenco proponas al Vi:

Kolegecan etoson en intima rondo;
Plibonigon de viaj instrukapabloj;
Moderkostan loĝadon kaj varian programon;
Agrablajn vesperojn kaj atentokaptajn ekskursojn.